# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale



PLENUMITA 03/10/2024 sepcentsepa eldono (unua eldono 26/09/2011)

## Aŭstraliaj Esperantistoj unua eldono 26/09/2011

## Aŭstraliaj Esperantistoj fina eldono 07/10/2024

Almenaŭ ĉiu semajne mi sole preparis la novaĵ-leteron kaj ret-elsendis ĝin.

Eĉ kiam mi loĝis en Ĉinujo dum unu jaro *Roger Springer*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

## Esperanta Retradio klaku la bluajn vortojn



Donas bonan ĉirkau -5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon

Ne estas facile elekti el la ĉiuj tagprogramoj Do aŭskultu ĉiujn.

Organizado de Esperanto-aranĝoj (1) 28/09/2024

## Uzu Esperantajn literojn Ĉ, Ĝ, Ĵ, Ĥ, Ŝ kaj Ŭ

Estas kelkaj proponoj rete. Elektu la plej facilan eblecon por vi kaj uzu ĝin.

Semoj en ŝrankoj ne kreskos,
Ekstere miloj
mortos.
SED




Unu disigita semo povas kreski ĝis bela estaĵo. Semu Esperanto-semojn



# Interesaj faktoj por Propagando

| *.Lernado de fremda lingvo postulas* | **Komparu Esperanton** |
| --- | --- |
| *Lernu legi la skribitan lingvon. Ofte ĝi ne agordiĝas kun la parolata lingvo...* | ..Fonetike senescepta |
| *Lernu la gramatikon. Ofte ĝi estas plena da esceptoj al la reguloj..............* | ..17senesceptaj reguloj |
| *Lernu vortliston taŭgan por via espera uzo..........................................* | ..Kunmetitaj vortoj |
| *Lernu la standardan prononcon. Ofte ne agordas kun la parolata lingvo..* | ..Unu prononco |
| *Lernu la lokan parolatan lingvon.......................................................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu la ĉiutage mallongigitan parolatan lingvon...............................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu la idiomojn de la lingvo ..........................................................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu kiel kompreni la parolatajn respondojn al viaj demandoj............* | ..Unu monda lingvo |

## Esperanto ne havas tiujn malfacilaĵojn

La plej multaj Esperantistoj lernis Esperanton kiam ili estas plenkreskaj

Do ili estas tre toleremaj kaj helpemaj al lernantoj. *Roger Springer*

# INVITO AL NEPALO

Bharat Ghimire, la prezidanto de la Nepala E-Asocio, invitas vin al Speciala Ekskurso 2025 en Nepalo, okazonta ekde la 26-a de februaro ĝis la 8-a de marto. Oni celas turismigi la partoprenantojn en mondfamaj turismaj lokoj de Nepalo, inkluzive la naskiĝlokon de Budao. Oni havos diversajn esperantajn eventojn por plivastigi la lokan movadon.
Ĉiuj aĝgrupoj povos facile partopreni ilin. Pliaj detaloj en la Eventa Servo
https://eventaservo.org/e/5734f0 *informas Katja Steele*



Saluton Roger!
Mi nepre informas vin ke loĝante en Anglujo, mi nepre penas ĉiutage semi por nia kara lingvo, Esperanto!
Amikajn bondezirojn je paco kaj sano. *Jennifer Bishop*



## La oktobra sesio de nia prelegserio (AEA)



**DIKTATURO KAJ ESPERANTO**

En 72 jaroj de ĝia daŭrigo (1918-1991) Jugoslavio spertis du diktaturojn: la unua en periodo 1929-1941, kaj (oni diras) la dua post la dua mondmilito, en periodo 1945-1991. Du diktaturoj donis malsamajn kondiĉojn por Esperanto: dum la unua diktaturo Esperanto estis malpermesita kaj esperantistoj persekutitaj, kaj dum la dua la ŝtato subtenis Esperanton, sed ne ĉiam finance. Tio estis la ora periodo por Esperanto ne sole en Jugoslavio, sed tutmonde. Interese, du plej gravaj esperantistoj, kiu multe laboris por la rekono de Esperanto, alvenis el Jugoslavio: Ivo Lapenna kaj Tibor Sekelj.

**Dimanĉe, la 20-an de oktobro 2024, je la 17:00-a (Sidneja tempo)**

Por akiri la ligilon skribu al: prezidanto@esperanto.org.au ***Ana Alebic-JURETIĆ***

# AEA estrarkunveno 2024-09-19

**Ĉeestis:** Heather Heldzingen, Joanne Johns, Terry Manley, Sandor Horvath, Bradley McDonald, Caroline Turner

**(1)Kunventempo dum la foresto de Jonathan** Ni decidis

**(a) Ni ŝanĝis la ritmon.** La venonta kunveno okazos venontan ĵaŭdon (26-an de septembro) Kaj poste ĉiun duan ĵaŭdon, do - la 26-an de septembro 2024- la 10-an de oktobro
- la 24-an de oktobro.......ktp

**(b) je la 13:00-a (por ke Jonathan ankaŭ povu partopreni el Kanado)**

**2) Somerkursaro 2025** Ĝis nun 20 homoj aliĝis .... Nia celo estos 40.

**Jen kelkaj de niaj ideoj** KIEL ALLOGI PARTOPRENANTOJN?


Jen la ideoj de niaj lastaj kunvenoj ... Ni "kontrolu":
- proponi nin al 1) radio stacioj kiel gastparolanton - 2) U3A .... maljunuloj havas genepojn - Disdono de niaj "vizitkartoj" en iu ajn loko
- Telefoni membrojn kaj nemembrojn kaj ankaŭ demandi ilin kiel ni allogu partoprenantojn
- Dum ĉiu kunveno ni raportu... kion ni faris dum la lastaj du semajnoj por allogi partoprenantojn - Granda elsendo al lernejoj/universitatoj... eble eĉ stipendio(?)
- Kontakti instruistojn, kiujn ni persone konas
- Certigu ke esperantistoj en aliaj ŝtatoj sciu pri la somerkursaro ..... kaj
- Regulaj retmesaĝoj al niaj membroj pri la preparado

HELPU KUN LA VARBADO!!!

**(3) Esperanto Domo en Melburno** La serĉado daŭras

**Venonta AEA estrarkunveno** Ĵaŭdon, la 26-an de septembro,
je la 13:00 NSW, VIC, TAS, QLD, ACT 12:30 SA , 15:00 NZ *Sandor Horvath*

# ESPERANTO POCKET TEXTBOOK




Poŝa Lernolibro de Esperanto por parolantoj de la angla.

**Propagandila kaj Fontindika Libreto. Vidu ankaŭ AE707B**

## Mem faru per via komputilo.

**Elŝutu PDF, 2.4 MB aŭ presu la 4 paĝojn sekvantajn**

http://aea.esperanto.org.au/sxlosilo/?lang=eo

**kaj mem kreu kopion de la poŝa ŝlosilo per via komputilo**

(Estas pli facile presi unu flanke kaj krei blankajn paĝojn en la libreto).


La historio de la originala Ŝlosilo ĉe paĝo 7 AE191 malnovaj kopioj de AE ĉi tie



## Esperanto-Flago por tabloj. Vidu ankaŭ AE707B

Bona propagandilo. Vidu AE158 malnovaj kopioj de AE ĉi tie

Presu la paĝon sekvante (paĝon 2) Kreu kopion de nia flago per via komputilo.


ESPERANTO
ESPERANTO